# Kiel mi instruas MAL?

La prefikso **mal-**

Sur la tabulo pendas la bildo Nr. 1 pri **virino**
juna
bela
alta
eleganta
gaja

Per demandoj kaj respondoj la kursanoj lernas la adjektivojn.
Post kovro de la adjektivoj ili lerte priparolas la ecojn de la virino sur la bildo Nr 1 .
Tiam oni forprenas ĝin kaj super la listo pendigas la bildon Nr 2, sur kiu estas virino je kontrastaj ecoj.
La demandon: *"Ĉu la virino estas juna?",* la kursanoj respondas:
"Ne, la virino ne estas juna".
Instruisto :"Kia estas la virino?"
Ili ne scias la vorton, do ripetas la demandon, kiel kutime:
"Kia estas la virino?"
Instruisto:" La virino estas maljuna" kaj per la ruĝa kreto aldonas la prefikson mal- al la supra listo.
Same oni faras kun ĉiuj adjektivoj.
**mal**juna
**mal**bela
**mal**alta
**mal**eleganta
**mal**gaja

La bildoj devas klare prezenti la diferencojn de epitetoj.
Kiam la kursanoj jam korekte kaj rapide rakontas pri la bildoj, oni povas montri aliajn bildojn ekzemple :

la domon novan, modernan, grandan, komfortan kaj ĝian kontraston,
objektojn: librojn,skatolojn,sakojn ( kaj enkonduki mezurojn kiel alta, longa,granda).

Por kontentigi la kursanojn dum ripetado kaj rompi la enuiĝon, oni povas proponi, ke ili demandu la instruiston. Kiam li cele "eraros" li kontrolas, ĉu la lernantoj atentas, komprenas kaj scias kiel korekti lin. Ĉiam la "ekzamenado" de instruisto kaŭzas grandan plezuron al la lernantoj.
La bildojn oni prenu el koloraj revuoj. Ili estu grandaj kaj konformaj al la temo.